

STARO

N-ro 4/2014 (253)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



foto SINCO Prostějov

Partoprenantoj de la 14-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
la 24-an ĝis la 26-an de oktobro 2014
Prostějov

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vladimír Dvořák, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 999 091, vladimir.dvorak@esperanto.cz, (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidentino: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

Kasisto: Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membrodatumbazo, kontado)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.dvorakova@esperanto.cz (membroj, kluboj, sekcioj, konferencoj, informado, retaj projektoj, ekspozicioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. UPC 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Komitatano: Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

Revizia komisiono de ĈEA:

Prezidanto: Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz, www.muzeum.esperanto.cz

Kontrollegis: la komitato, M. Turková, P. Polnický, J. Krolupper, V. Türk

14-a ĈEA-kongreso

okazis en la tagoj 24-an ĝis 26-an de oktobro en Prostějov en Junulardomo, strato Palečkova (loĝado kaj prelegoj) kaj en Domo de Servoj, strato Olomoucká (ĉefa kongresa traktado kaj kultura vespero). Partoprenis ĉirkaŭ 80 personoj, ankaŭ gastoj el Slovakio, Pollando, Germanio kaj Svedio.



Traktado en la manĝejo de la junulardomo

La vendreda vespero estis dediĉita al kulturo, kantado de Miroslav Smyčka, projekciado de filmeto pri UK en Argentino, kiun partoprenis kaj tie filmis Libuše kaj Viktor Dvořák el Moravské Budějovice, kaj prezentado de novaj libroj. Lenka Angelova priskribis broŝureton pri F. V. Lorenc, Miroslav Malovec novan libron kun poemtradukoj el Otokar Březina, novaĵojn el siaj eldonoj prezentis Petr Chrdle (*Konciza historio de Kristanismo*, nova eldono de *R.U.R.*, primovada legolibro *Bonvenon en nia mondo*, enĉeĥigita libro *Maŝkarada kolem smrti*) kaj Peter Baláž (*Komputeko, Historio de UEA, Život Zamenhofa*). La libroj kun multaj aliaj estis aĉetebraj en libroservo.

ĈEA-prezidanto Vladimír Dvořák poste klarigis, ke la nova Civitana Leĝaro,

valida ekde januaro, komplikigis nian situacion, ĉar laŭ ĝi la kongreso ne rajtas voĉdoni kaj elekti novan estraron, ĉar venis malpli ol duono de ĈEA-membroj.



Traktado en la salono de Domo de Servoj

Por la ĉefa kongresa traktado sabate matene ĉiuj transiris al la salono de Domo de Servoj. Pavla Dvořáková priskribis la agadon de nia asocio dum la pasintaj tri jaroj kaj la prezidanto prioritatojn de la komitato (Esperanto-muzeo Svítavy, stabila budĝeto, projektoj de ciferecigado kaj fonoteko, disponigo de la muzea biblioteko kaj de ciferecigitaj materialoj al la publiko).

La agadon kaj aranĝojn de la muzeo en Svítavy prezentis Libuše Dvořáková. Raporton pri la asocia ekonomio tralegis Vratislav Hirš, pri delegita reto Petr Chrdle kaj revizian raporton Jan Řepa.

Poste Petr Chrdle revenis al la klarigo pri la nova Civitana Leĝaro, laŭ kiu devos plu labori la ĝisnuna komitato. Tamen ĝi povas koopti ankoraŭ tri personojn.

La plej solena momento estis transdono de Honora Membrecio al s-anoj Jan Duda kaj Josef Vojáček kaj de Honora Aprezo al 15 samideanoj pro eksterordinara laboro dum la lastaj tri jaroj. La antaŭtagmezan traktadon finis komuna fotado.



Organizanto Jaroslav Liška invitas la kongresanojn al promeno tra la urbo

Posttagmeze la kongresanoj promenis tra la urbo. Unue ili vizitis proksiman preĝejon kaj la urban teatron, poste loka ĉiĉerono gvidis ilin tra gravaj urbaj stratoj kaj rakontis pri signifaj domoj, fine ili rigardis Esperanto-ekspozicion en vestiblo de kinejo Metro.



Vizito de preĝejo

En la manĝejo antaŭ la vespermanĝo oni diskutis pri diversaj celoj de la movado kaj asocio kaj vespere ĉiuj transiris al la granda salono de la Domo de Servoj.

Post enkonduka danceto de du junaj majoretinoj venis familia vakermuzika grupo Marod Ostrava (Matláškovice rodina – familio Matlášek), kiu konsistas el la gepatroj, du geknaboj kaj onklo. Ili

kantis ĉefe en Ostrava-dialekto kaj angle, ankaŭ proprajn kantojn.



Muzika grupo MAROD Ostrava, Georgo Handzlik kaj danco

La kulmino de la vespero estis koncerto de Georgo Handzlik el Pollando, kiu kantis siajn kantojn kaj kelkajn de Jarek Nohavica en Esperanto-traduko, kutime kantojn de satira enhavo. La vesperon riĉigis ankaŭ tombolo, kiun sprite konferanseis Kvido Janík kun violona akompano de Jan Duda. Kaj ne mankis danco laŭ reprodukita muziko.



Kongresa libroservo

Dimanĉa antaŭtagmezo en la manĝejoj estis dediĉita al redaktado de la Kongresa Decido, kiu konstatis, ke pro nova Civitana Leĝaro estas elektado de nova komitato prokrastita, ke estis aprobitaj raportoj pri agado, ekonomio kaj revizio, du honoraj membrecoj kaj kiel asociajn prioritatojn oni akceptas zorgon pri Esperanto-muzeo en Svitavy, klopodon pri ekvilibra budĝeto, ciferecigadon de gravaj tekstoj kaj fotoj kaj ilian disponigon por la membraro.



Fina redaktado de la decido

La kongreso taskas la komitaton prepari novan asocian statuton, konferencon en 2015 kaj kongreson en 2016, rekomendas al la membroj sekvi la asocian domajnon, propagandi nian muzeon

kaj ĉiujare aktualigi datumojn (adresojn, telefonojn ktp.), alvokas la membrojn partopreni en la asociaj projektoj kaj preparo de nova statuto.

Fine la kongreso prenis en konsideron la aljuĝon de Honoraj Aprezoj kaj alvokon trovi novajn komitatanojn por propagando, subvencioj kaj kunlaboro kun ekstermovadaj organizoj.

Dum la tuta kongreso funkciis riĉa libroservo, fakte du libroservoj, unu asocia, kiun prizorgis Marie Ĉumová, kaj dua slovaka de Peter Baláž, kiun akompanis parto de lia teamo de eksterlandaj volontuloj. Peter Baláž prezentis ankaŭ novajn projektojn (Mluvtecesky.net, Lingvo.info, Monda.eu).

Teknikan flankon de la programo sukcese ĉefprizorgis Miro Hruška

Amuza estis ankaŭ vendreda spektakleto de pudelo de Zdenka Novotná, kiu dresis la hundeton aŭskulti ordonojn en Esperanto. Komune ili prezentis malgrandajn cirkaĵojn.

Pavla Dvořáková en la nomo de la asocia komitato dankis al la loka klubo pro altnivela organizado de la kongreso, precipe al la prezidanto Jaroslav Liška. La klubo prizorgis propagandajn materialojn pri la urbo kaj eĉ senpagan veturbileton por la urba trafiko.

Miroslav Malovec



Gaja tombolo

Fotoj: O. A. Fischer, K. Janík, J. Liška, K. Vala

Rozhodnutí 14. sjezdu Českého esperantského svazu, který se uskutečnil v Prostějově od 24. do 26. října 2014

Sjezd k volbám rozhodl:

1. po vysvětlení dopadů nového Občanského zákoníku (dále NOZ) předsedou volební komise Petrem Chrdlem (zejména usnášeníschopnost) odložit samotné volby o 2 roky, tzn. prodloužit funkční období stávajícího výboru na celkem 5 let, jak umožňuje NOZ, s přihlédnutím k faktu, že k dnešku se nepřihlásil žádný nový kandidát, přičemž dosavadní výbor i revizní komise jsou připraveny pokračovat ve svých funkcích,
2. schválit setrvání výboru pro období 2014-2016 ve složení: Vladimír Dvořák – předseda, Libuše Dvořáková ze Svitav – místopředsedkyně, Vratislav Hirš – pokladník, Miroslav Malovec – člen, Pavla Dvořáková – členka, Miroslav Hruška – člen,
3. schválit setrvání revizní komise pro období 2014-2016 ve složení: Jan Řepa – předseda, Věra Gavandová – členka, Ludmila Srbová – členka,
4. podpořit výbor v případné kooptaci až 3 dalších členů pro oblast dotačních programů, propagace a spolupráce s dalšími organizacemi či zájemci o vedení ČES v dalším období po r. 2016.

Sjezd schválil:

1. zprávu o činnosti ČES za období říjen 2011 až říjen 2014,
2. zprávu o hospodaření za období říjen 2011 až říjen 2014,
3. zprávu dozorčí rady za rok 2013,

4. udělení čestného členství Janu Dudovi a Josefu Vojáčkovi,
5. návrh priorit ČES do r. 2016, a to:
 - Muzeum esperanta ve Svitavách
 - dle možností udržovat vyrovnaný rozpočet
 - projekty digitalizace a fonotéky
 - zpřístupnění muzejní knihovny a digitalizovaných materiálů pro členy a veřejnost

Sjezd ukládá:

1. výboru ČES připravit a na webu www.esperanto.cz zveřejnit do 31. 8. 2015 návrh nových stanov, které by schvaloval sjezd (zřejmě na náhradním zasedání) na podzim r. 2015 a které by lépe vyhovovaly praktickým potřebám ČES dle NOZ (zejména volby a názvosloví),
2. výboru ČES zorganizovat v r. 2016 volební sjezd/konferenci.

Sjezd doporučuje:

1. všem členům ČES sledovat webové stránky www.esperanto.cz,
2. všem členům ČES propagovat Muzeum esperanta ve Svitavách a podporovat jeho činnost,
3. klubům a sekcím dbát na každoroční aktualizaci svých údajů a dbát na provedení voleb svých orgánů v souladu se stanovami ČES.

Sjezd vyzývá:

1. členy k větší aktivitě a vytváření nových pracovních skupin či k zapojení se do již existujících,

2. kluby a sekce k zapojení se do již existujících projektů ČES,
3. členy k zapojení se do přípravy návrhu nových stanov,
4. zájemce o vedení ČES po r. 2016, aby kontaktovali výbor a postupně se zapojovali do jeho činnosti.

Sjezd bere na vědomí:

1. výborem vymezená kritéria čestných uznání a jejich udělení za aktivní činnost ve prospěch esperanta zejména v období 2012-2014 pro tyto členy: PhDr. Kamila Bártlová, Marie Čumová, MVDr. Oldřich Arnošt Fischer, Alois Jakubec, Václav Kaprál, dr. Max Kašparů, Jaroslava Malá, Jan Řepa, Mirka Tomečková, Vladimír Türk, Anna a Jiří Vyšinkovi a dále pro Pavola Kaščáka a Pavla Raka, divadelní soubor DOMA, skautské centrum Vanaivan,
2. udělení čestného diplomu UEA pro MVDr. Františka Rytíře za nepřetržité čtyřicetileté členství.

V Prostějově 26. října 2014

ALVOKO

Karaj membroj de ĈEA,

kiel videblas el la akceptita decido de la ĉi-jara kongreso, la estraro serĉas inter vi kandidatojn por fariĝi ano de:

1. laborkomisiono, kiu proponos aktualigitan statuton de ĈEA helpantan al ni praktike ekzisti, ĉar la nova civitana leĝaro preparis al similaj asocioj kelkajn sp(r)itaĵojn. La novan statuton devos pri-trakti kaj akcepti la kongreso aŭtune 2015 kaj la propono devas esti prezentita ĝis 31.8.2015.

La komisiono jam konsistas el Vladimír Dvořák, Petr Chrdle kaj Vlastimil Kočvara, sed ni volonte akceptos pluajn, kiuj regas (aŭ pretas dediĉi sian tempon al studado) civitanan juron aŭ havas spertojn pri la afero el aliaj asocioj.

2. la estraro, kiu plu serĉas membrojn okupiĝantajn pri propaganda laboro, sfero de subvencioj aŭ plia kunlaboro kun organizoj ene, sed ankaŭ ekster nia movado. Tute ne timu, ke la novulo prizorgos ĉiujn menciitajn terenojn!

Krome oni invitas ankaŭ adeptojn por ĈEA-gvidado post la jaro 2016, kiuj intertempe povus akiri praktikajn spertojn ĉu rekte kiel estrarano ĉu ekzemple kiel iu observanto. Bv. anonciĝi adeptoj por ĉiuj kampoj sendepende kiuj nuntempaj estraranoj ne plu kandidatiĝos en la jaro 2016, ĉar ĉiukaze bezonatas „nova sango“ post 5 jaroj, des pli ekde la jaro 2011 ĝis nun aperis neniu nova kandidato entute. Ne timu aliĝi ankaŭ membroj sen praktikaj spertoj, sed kun ideoj kaj vizio, ĉar dum unu aŭ du jaroj oni spertojn kaj superrigardon ekhavas.

La estraro povas koopti ĝis 3 personoj.

Kandidatoj por ambaŭ pozicioj bv. retmesaĝi al

vladimir.dvorak@esperanto.cz

aŭ telefoni al 774999091, kie mi volonte respondos ankaŭ demandojn. La alvoko havas konstantan validecon sen ajna tempolimo.

Vladimír Dvořák, ĈEA-prezidanto



Novaj honoraj membroj de ĈEA

Jan Duda naskiĝis la 25-an de junio 1938 en Újezd u Rosic. Li estas finstudinto de konservatorio en Brno kaj profesia violonisto, multjara membro de Moravia filharmonio kaj de ties arĉkvarteto kaj fine de sia kariero de la Nacia simfonia orkestro en Prago.



Esperanton li ekstudis en 1956 kiel studento en kurso de s-ano Vondroušek en Brno, li aktive partoprenadis kluban vivon, unue en Brno kaj sekve en

Olomouc, inkluzive koncertadon kaj aktoradon en teatraĵoj. Ekde 1976 li estas membro de ĈEA. En la 1980-aj jaroj li faris serion de 20 vojaĝprelegoj kun projekciado, organizitaj en diversaj kluboj en la tuta Moravio. Li aktive partoprenis kvin Universalajn kongresojn, koncertis kaj prelegis pri muziko ĉe la Universala Kongreso en Prago en 1996. Li multfoje riĉigadis per sia arto programon de Internaciaj Kulturaj Festivaloj en Ústí nad Labem, li koncertis okaze de kongresoj kaj konferencoj de ĈEA kaj dum diversokazaj aliaj aranĝoj en kluboj. En 1991 li ekzameniĝis pri kapablo instrui. Li esperantigis porjunularan libron de Karl Bruckner "Sadako devas vivi" pri knabineto mortinta post atombomba atako al Hiroŝima, kaj proprakte eldonis ĝin sur kompaktdisko. Plurajn jarojn li gvidis Esperanto-klubon en Olomouc, li meritis pri la ebleco estigi Esperantan sektion de Patrujsciencia muzeo en Olomouc, kies klubojn Esperanto-klubo povas ĝis nun utiligi. En 2011 li mem kreis ekspozicion pri Esperanto kaj dufoje prezentis ĝin en Regiona scienca biblioteko en Olomouc. Li publike prelegis pri Esperanto kaj prezentis ĝin en radio kaj ĉeforganizis solenaĵon omaĝe al 100-jariĝo de la Esperanto-klubo en Olomouc.

La honora membreco estas proponata precipe pro tutviva kluba aktivado, pro altnivela muzika riĉigado de kulturaj programoj de gravaj Esperataranĝoj nialande kaj pro diskonigo de Esperanto en kultura sfero.

Josef Vojáček naskiĝis la 18-an de decembro 1943, fariĝis inĝeniero. Esperanton li lernis en kurso de s-ro Vondroušek en la lernojaro 1965-66, en la



jaro 1966 membriĝis en E-klubo en Brno kaj en 1969 en ĈEA. Esperanton li instruadis en Lančov. Kiam li instruis studentojn de Masaryk-universitato en Brno pri komputiloj, li akiris ankaŭ pedagogian doktoran titolon

per laboraĵo pri duonaŭtomata teksto-tradukado en Esperanton. En 2004 en Komárno li akiris titolojn de AIS Doktoro pri kibernetiko kaj Asociita docento.

En la Masaryk-universitato li sukcesis enkonduki kursojn de Esperanto kaj interlingvistiko, kiujn li gvidis ankaŭ kiel emerito. La kursoj ne estis nur hobiaj rondetoj, sed estis envicigitaj inter oficialajn universitatajn lecionojn, al kiuj ĉiu studento povis laŭplaĉe aliĝi. En la pedagogia fakultato li instruis Esperanton inter la jaroj 2002 ĝis 2009. La komenco estis ebla danke al aprobata projekto por instruado de Esperanto en kadro de disvolvaj projektoj de MŠMT.

La aŭtunajn semestrajn kursojn *Esperanto 1* trapasis 304 studentoj, unu kurson por instruistoj plenumis 5 instruistinoj. Dum someraj semestraj kursoj *Esperanto 2* li instruis 56 studentinojn. Tri partoprenis someran kurson en Lančov – *Esperanto 3*. Studobjekton *Klerig-kibernetiko* plenumis 7 studentoj. En Olomouc ĉe la naturscienca fakultato de Palacký-universitato li instruis du jarojn post emeritiĝo, en *Esperanto 1* ĉirkaŭ tridek studentojn, en *Esperanto 2*

ĉirkaŭ dek. En la filozofia fakultato de Masaryk-universitato ekde la printempa semestro 2012 *Esperanto I* li havis 115 studentojn, dum 2 aŭtunaj semestroj *Esperanto II* li instruis 6 studentojn kaj por *Enkonduko en interlingvistikon* 25 studentojn.

Li kreis ankaŭ propran lernolibron surbaze de la video-kurso Mazi en Gondolando. Al la seminarioj KAEST li kontribuis per siaj artikoloj *Kelkaj problemoj de duonaŭtomata tekstotradukado*, *Komputiloj de unueca sistemo*, *Programado kaj ĝia instruado* kaj *Komputiloj, interreto, edukado, Esperanto*. Plurfoje li aranĝis en gravaj bibliotekoj en Brno la migran ekspozicion *Ĉu Esperanto estas morta lingvo?*, estis intervjuata pri Esperanto en ĵurnaloj kaj Radio Brno, foje li aperis eĉ en televido en konkurso, kie la konkursantoj devis diveni, ke li estas instruisto de Esperanto.

En la asocio li gvidis sekcion pri informadiko kaj laboris aktive en la pedagogia sekcio. Li ankaŭ sukcesis eldoni plurajn ĉeflingvajn artikolojn pri instruado de Esperanto, ofte en fakaj periodaĵoj. En 2013 li havis komunan prelegon kun prof. Fösmeier pri *Metodiko de instruado ĉe AIS* kaj en 2014 li prelegis pri *Enkonduko en interlingvistikon* en kolokvoj de Universitato de defendo en Brno.

La honora membreco estas proponata precipe pro instruado de Esperanto kaj interlingvistiko en universitato, pro prezentado de la movado en radio, televido, gazetoj, bibliotekoj, kolokvoj kaj seminarioj, pro prilaboro de lernolibro kaj pro faka agado.

HONORA APREZO

La komitato decidis lanĉi novan diplomon, kies nomon vi vidas en la titolo. Ĝi estas atribuata unufoje ne nur al unuopuloj, sed ankaŭ al grupoj kaj ene kaj ekster ĈEA, kiuj precipe en la koncerna balotperiodo elstare kontribuis favore al ĈEA kaj la movado.

Ĝin povas ricevi nek jam honora membro de ĈEA, nek funkciulo por la aktivado koncernanta plenumadon de lia/ŝia funkcio.

La komitato opinias, ke necesas pli videbligi diversajn agadojn kaj per tio stimuli ankaŭ aliajn.



Do, jen la listo de la unuaj 15 premiitoj laŭ la membreco en ĈEA kaj alfabeto:

- d-rino Kamila Bártlová - por eldona, gazetartikola kaj instrua aktiveco,
- Marie Čumová - por sistema oferema prizorgo de Muzea biblioteko kaj arkivo,
- d-ro Oldřich Arnošt Fischer - por modela faklingva prelega verkaro,
- Alois Jakubec - por prezento de Esperanto en Tutŝtata filatela ekspozicio kaj por donaco de sia ekspoziciaĵo al Esperanto-Muzeo,
- Václav Kaprál - por sponsorado de la monumento Kapo XXII kaj donaco de sia kolekto al Esperanto-Muzeo,

- d-ro Max Kašparů - por sponsorado de Esperanto-arbo en Lipnice n.S. kaj por prezento de Esperanto en la prestiĝa publikaĵo „České vize Evropy?“,

- Jaroslava Malá - por ciferecigo de manuskriptoj,

- Jan Řepa - por aktorado en R.U.R. de Karel Čapek kaj por diskonigo de la ĉeĥa kulturo eksterlande,

- Mirka Tomečková - por lektorado de korespondaj kursoj kaj por ilustra kreado,

- Vladimír Türk - por cifereciga laboro kaj kreado da aŭdvidaj dokumentoj,

- Anna kaj Jiří Vyšinka - por prizorgado de Libroservo,

- Pavol Kaščák - por sukcesa lanĉo kaj disvolvo de la projektoj "Verda Stacio" kaj "Internacia Esperanto-Lernejo" en Bartošovice,

- Pavel Rak – por longdaŭra poresperanta ilustra kreado,

- Teatra ensemblo DOMA Svitavy sub gvido de d-rino Radomila Oblouková por surscenigo de R.U.R. de Karel Čapek kaj por propagando de la ĉeĥa kulturo pere de Esperanto eksterlande,

- Skolta centro VANAIVAN por savo kaj renovigo de esperanta memorŝtono en Kopřivnice.

Dankon por ilia laboro!

Vladimír Dvořák, ĈEA-prezidanto



Trijara periodo de la prioritatoj el la kongreso en Šumperk 2011 kaj novaj alvokoj el la kongreso Prostějov 2014

Ĉi-artikole mi resumas miaokule trijaran plenumadon de la prioritatoj stariĝitaj de la tiam nova komitato dum la kongreso aŭtune 2011. Skizitan raporton mi prezentis dum la ĉi-jara kongreso, sed taŭgas ĉion priparoli pli detale kaj por ĉiuj membroj, ĉar la kongreso 2014 prioritatojn restrukturaligis kaj do sekve parto el ili finas sian rolon.

Ĉio krome estu instigo por vi – membroj de ĈEA – ĉu en iu sfero vi povus kaj volus engaĝiĝi, ĉar sen via aktiva kontribuo la komitato sukcesos fari malmulton.



foto O. A. Fischer

1. Financa stabiligo kaj iom-post-ioma transiro al ekvilibrita budĝeto

Kiel oni facile vidas el la financaj jarraportoj aŭ ĉiujaraj budĝetoj kaj kiel prezentis la kasisto V. Hirš, ĈEA sukcesis ne nur akiri financon stabiligon kaj ekvilibritan budĝeton, sed iom-post-iom ĝia havaĵo kreskas.

Memkompreneble la havaĵo ne estas granda, tamen la tendenco estis klara kaj ĝojiga.

Faktoroj, kiuj plej helpis:

– kondiĉa aliro al la presita Starto por la

dumvivaj membroj,

– unufoja enspezo flanke de la premio Cigno,

– ne nur finance tre sukcesa Trilanda konferenco en Břeclav,

– malavaraj mondonacoj ĉefe de la membroj,

– lokaj urbaj subvencioj por la okazigitaj kongresoj/konferencoj,

– malpli granda nombro de komitatokunsidoj (nur printempa kaj aŭtuna).

Kelkaj aferoj bedaŭrinde ne ripetiĝos, sed iu pozitiva bazo restas.

Plu daŭras ŝparado en du gravaj teritorioj – nome en ekonomia mastrumado, kiun nia kasisto V. Hirš plenumas senpage, kaj la samo validas por Libroservo nun mastrumata de M. Ĉumová (kune kun libroarkivado) post transporto al nia sidejo en Svitavy. Ĝi restas laŭ la kontrakto sen lupago, kvankam memkompreneble ni havas pluajn elspezojn por nia Esperanto-muzeo kaj ekspozicioj en ĝi, kiel videblas en la ĉiujara budĝeto.

Same la tuta komitato servas senpage kio estas multjara ĝenerala kutimo.

Ekde 2011 ni prezentas pli detalan budĝeton, raporton pri la mastrumado kaj staton de nia havaĵo.

Neŭtrale por la budĝeto efikas nova membrotizaro akceptita en 2012.

Minacoj por la estonteco estas ĉefe malpli da enspezoj pro iom-post-ioma membra malkresko kaj pro preskaŭ senprofitaj konferencoj/kongresoj. Kontraŭstari tion povas nur pli granda aktiveco de ni ĉiuj koncerne klarigadon kial (r)esti membro kaj kial kongresi.

La prioritato kun iom ŝanĝita titolo restas ankaŭ por venontaj 2 jaroj.

2. Aktualigo kaj kompletigo de la datumbazo de la membroj kaj kluboj/sekcioj

Aperis nova legitimilo kaj asocia aliĝilo.

Plu kolektiĝas kaj amasiĝas la retadreso, kion la komitato konsideras plej konvena kaj senkosta maniero por kontaktiĝi.

El sukcesa enketo por la kluboj kaj sekcioj rezultis ne nur rekontaktoj al preskaŭ ĉiuj kluboj/sekcioj, sed ĈEA sur sia retpaĝaro povis publikigi pluajn informojn pri klubaj reprezentantoj kaj kunvenoj. Nelastvice fine oni nun pli orientiĝas en jura problemaro, kiu fakte posedas juran memstarecon.

Bedaŭrinde la ĉi-jara peto pri aktualigo preskaŭ fiaskis, ĉar nur 4 kluboj la formularon plenigis, kio signifas, ke la informoj malnoviĝas. La kongreso pro tio decidis akcepti rekomendon pri tio, sed ĉu la informoj estos aktualaj dependos nur de kluboj kaj sekcioj mem. Pri subskribitaj kontraktoj kun jure memstaraj kluboj mi jam parolis pasintjare kaj same daŭris kelkaj vizitoj de P. Dvořáková al kluboj kaj sekcioj.

La taskon de ĝusta individua datum-bazo kun (amaso da) retadreso ni konsideras plenumita kaj ĝi ne plu aperas inter prioritatoj.

Ĉu la kluba/asocia datumbazo estos aktuala dependos nur de bonvolo kaj kompreno de la koncernatoj.

3. Aktivigo kaj klerigado de la membrobazo (lingva, reta)

Retrorigardante trijaran periodon la ĉefa aranĝo por interŝanĝi opiniojn kaj

ion ellerni estis sendube vere internacia Trilanda konferenco en Břeclav en septembro 2012.

La sekvajn naciajn en la jaroj 2013-14 en Nymburk kaj Prostějov partoprenis 50 kaj 80 homoj. Enkadre de ili en 2013 okazis klerigaj programeroj (ekz. pri-komputilaj programeroj gvidataj de M. Hruška aŭ interpretado de turismaj tekstoj sub gvido de P. Dvořáková), dum ĉi-jare ni koncentriĝis pri oficaj aferoj (balotoj, raportoj kaj estontaj vizioj) kaj pro komencantoj multajn partojn oni traktis en la ĉeĥa.

El pure kleriga kaj informa vidpunktoj tute certe plej granda restis Vikimanio tuj en oktobro 2011, kiu pro la temo mem allogis multajn amaskomunikilojn. En septembro 2013 oni festis 5-jariĝon de la Esperanto-Muzeo kune kun la 80-jariĝo de Esperanto en Svitavy, en kies kadro oni traktis kelkajn klerigajn programerojn. Tio-ĉi plu validas kaj ripetindas el la lasta raporto.

Ĉiujare okazadas lingva seminario en Skokovy, kiu en 2013 kuniĝis kun faka seminario Sabla printempo (dediĉita precipe al voĉregistrado) kaj al kiu la komitato jam dufoje prijuĝis subvencion por kovri parte kostojn de la lektoroj, ĉar ni konsideras ĝin ĉi-momente la ĉefa aranĝo en Ĉeĥio por lingva kaj faka klerigado kaj volas apogon daŭrigi.

Sur la ĈEA-retpaĝaro aperadas regule artikoloj ankaŭ pri komputila kaj lingva kleriĝado (plejparte danke al M. Hruška), retejan parton pri movada historio kaj literaturo prizorgas M. Malovec.

Ĉio ĉi (krom Vikimanio) plu daŭros espereble kun la sama intenso kaj apogo kaj la kongreso ne sentis neceson tion inter la oficiale skribitaj prioritatoj.

ĈEA tamen tre bonvenigas pluajn lingvajn seminariojn, pri kiuj ĝi mem ne zorgas kiel ekz. SES en Slovakio aŭ IEL en Bartošovice kaj rekomendas al siaj membroj partopreni.

4. Strebado engaĝi en subvenciaj projektoj ekz. por malpliaĝuloj aŭ gejunuloj

Kontraŭvole post balotoj la taskon transprenis Pavla Dvořáková, ĉar neniuj pretis, kvankam ni turniĝis al kelkaj membroj kaj eĉ esperantistoj ekster ĈEA.

Ĝis nun tiu ĉi pozicio vakas kaj neniuj projektoj finaliĝis (kvankam P. Dvořáková pretigis bazajn pristudojn), ĉar ŝi devis transpreni aliajn urgajn taskojn.

Tio ĉi estas iom modifitaj vortoj same ĉerpitaj el la pasintjara raporto, kiuj bedaŭrinde plu validas. La pasintjara konferenco akceptis, ke la komitato ne havas fortojn dediĉi sin al tiu ĉi grava kampo, dumjare aperis neniuj kaj sekve ĉi-jara kongreso forigis la aferon de la prioritatoj, ĉar simple neniuj pretas engaĝiĝi.

Granda atingiĝo tamen estas premio de la Fondaĵo Cigno, ĉar ja vere oni multon publikigis en ĉeĥaj amaskomunikiloj pri esperanto kaj ties movado kaj aktivado kaj ni rikoltis tion.

Laŭdinda kaj ripetinda fakto estas, ke ĈEA ricevis inter 2012-13 de la membroj aŭ de anonimulo signifajn monsumojn aŭ sen konkreta difino aŭ por konkretaj celoj. Al ĉiu donacinto ĈEA regule dankas laŭ siaj eblecoj. Tio-ĉi vere multe helpis al ni teni plusan budĝeton kaj subvencii kelkajn projektojn, ĉar diversaj kostoj pli kaj pli kreskas.

Se iu el vi konsideras tiun ĉi teritorion proksiman al vi kaj volus helpi al nia

tuta movado, senhezite skribu al la komitato pri viaj ideoj kaj eblecoj!

5. Kreado de komisionoj/grupoj kun klara koncepto

Modele aktivas ĉ. 10-membra Muzea kaj ekspozicia grupo sub gvido de Libuše Dvořáková. Ŝi ankaŭ kiel prezidantino de la loka klubo zorgas pri la ĉiutaga muzea vivo, dum la ekspoziciojn estras Pavla Dvořáková, sub kies prizorgo krome cirkulas la migra ekspozicio pri Esperanto, startinta en Písek kaj vizitinta ekde oktobro 2011 pliajn 30 urbojn en 10 regionoj tra la tuta lando.

En la muzeo mem ĉiujare estas instalita nova ekspozicio, ekde septembro 2014 ĝi estas "Esperanto kaj kolekto".

M. Malovec kun V. Türk kaj kelkaj aliaj unuopuloj (menciindas J. Malá, J. Dubinová kaj K. Votoček) diligente laboras pri ciferecigado de esperantaj materialoj kaj entute korektis, skanis kaj ciferecigis jam plurmil paĝojn de tekstoj.

Kadre de la projekto "Fonoteko" kunordigata de P. Dvořáková realiĝis kelkdek sonregistraĵoj muzikaj kaj parolaj.

Pli malpli stagnas aktivado de la pedagogia grupo. La plej granda sukceso estas daŭrigo de oficialaj Esperanto-kursoj en Masaryk-Universitato gvidataj de J. Vojáček. Krome laŭ iniciato de Viktor Dvořák la komisiono (J. Melicháková, M. Malovec, J. Vojáček) prilaboris kaj aŭtune 2013 transdonis al Ministerio pri klerigado tekstojn koncerne envicigon de Esperanto inter devige elekteblaj duaj fremdlingvoj en ĉeĥaj bazlernejoj. Vidu http://www.literatura.bucek.name/ilei/dr_uhyjazyk.html.

Komputilajn aferojn prizorgas ĉefe Miro Hruška, sed krome menciinda sendube estas A. Tomeček zorganta pri teknika parto de nia retejo. Ĉi-kampe malgraŭ planoj ni ne sukcesis krei pli modernan novan retejon kaj momente ni eĉ rezignis konservante nunan „vizaĝon“ (kun kelkaj partaj plibonigoj).

Bedaŭrinde mankas grupo pri subvencioj kaj ankaŭ pri tradukado. Koncerne kontribuadon al Vikipedio plej elstaras J. Hron, kiu ankaŭ plu prilaboras novan version de sia granda interreta vortaro (elŝuteblan en www.esperanto.wz.cz). Ŝajnas tamen, ke kontribuajtoj por Vikipedio jam superis sian pintan periodon.

La kongreso plu decidis elstarigi pluan laboron de ciferecigado kaj voĉregistrado kiel memstaran prioritaton por venontaj jaroj kaj rikolti dumtempe ties rezultojn.

La Muzea kaj ekspozicia grupo memkompreneble plu laboros kaj restos forte ligita kun Esperanto-Muzeo en Svitavy, kio restas inter la ĉefaj prioritatoj.

6. Uzado de modernaj teknologioj ekde retmesaĝoj ĝis interreto

Espereble la aktiva parto de ĈEA orientiĝas en la reto kaj por kontakti regule uzas retmesaĝojn. Same la komitato mem klopodas plene fruktuzi modernan kaj senpagan teknikon por sia agado kaj intertraktado ekde retmesaĝoj ĝis skajpado. Sekve ĝi kunvenas nur dufoje en la jaro (printempe kaj aŭtune), kio ŝparas niajn komunajn rimedojn. Ĝi krome preskaŭ kompletigis liston de la membraj retadreso kaj ĉiam alvokas siajn anojn aliĝi kaj profiti de tia rapida komunikado. Ekz. por la ĉi-jara kongreso oni devis uzi nurnuran 1 poŝtaĵon. Ekzistas ankaŭ ebleco aliĝi kaj utiligi

unuecan adresaron ĉe @esperanto.cz, kiu servas ne nur por la komitato kaj kluboj/sekcioj. Pliaj homoj abonas senpagan informilon Retkomunikoj, kiu servas eĉ por esperantistoj ekster ĈEA kaj kies abonkvanto jam superis 400.

Starto aperas ankaŭ en elektronika formo kaj ekde 2014 ekzistas versio por nevidantoj.

Ŝajnas, ke ĈEA tiukampe jam transiris al rutina procedo kaj pro tio la afero ne plu estas prioritato.

7. Esperanto-Muzeo en Svitavy

Modele kaj akorde al siaj eblecoj laboris kaj Muzea kaj ekspozicia grupo de ĈEA kaj la loka jure memstara klubo, kiuj signife kontribuis al la fakto, ke ĈEA povas pri la muzeo fanforoni, kvankam ĉio funkcias preskaŭ sen ajnaj monsubvencioj kaj en amatoraj kondiĉoj, kion ĉiam necesas konsideri kompare ekz. kun ŝtataj institucioj.

Relative oftaj aktivecoj okazadis danke al subteno de la urbo kaj laboremo de volontuloj el ambaŭ grupoj. Krom akcepto de individuaj kaj grupaj gastoj en la muzeo okazas pluraj Esperanto-aranĝoj: juniaj Muzeaj noktoj kun bunta programo kaj inaŭguro de la ekspozicio (ĉi-tempe „Esperanto kaj kolektado“), Infana tago, Tago de malfermitaj pordoj, Marcipana Kristnasko k.a.

Ĉiujare okazadas rekte en ĝi aŭ estas almenaŭ parte ligita kun ĝi unu plurtaga internacia aranĝo (Vikimano en novembro 2011, OSIEK-Konferenco en julio 2012, KELI-Kongreso somere 2013, Mezeŭropa renkontiĝo de junularo en marto 2014).

Altiĝis ankaŭ kvanto de neesperantaj aranĝoj (ne nur vojaĝprelegoj) okazintaj en la muzea ejo.

En la biblioteko danke al M. Ĉumová estas katalogigitaj jam pli ol 14 000 bibliotekaj unuoj. Muzea komputilo estis kompletigita je novaj multmediaj libere elŝuteblaj dosieroj, vigliĝis la muzea retejo, estis kreita muzea paĝo ĉe Facebook, internaciaj kontaktoj kreskis i.a. pro la Ipernity-paĝo.

Okazis internaciaj kontaktoj kaj libroiinterŝanĝoj kun IKC Herzberg, GEA-Biblioteko Aalen, Nacia Esperanto-Muzeo en Gray kaj donace ni ricevis librojn el Esperanto-muzeo en Vieno. Pri la muzeaj aktivecoj aperis pluraj informoj en la distrikta gazetaro kaj televido.

Ne nur pro tio, ke la sidejo de ĈEA estas sur la sama adreso, memkompreneble Esperanto-Muzeo plu restas kiel unu el ĉefaj prioritatoj ankaŭ por la venontaj jaroj.

KONKLUDO

Resume sendube ekzistas multaj laborendaj terenoj, por kiuj niaj fortoj ne sufiĉis, sed komparante ĝin kun nombro de engaĝigitaj personoj oni faris multon. Mi opinias, ke ĈEA-aktivado dum la lastaj 3 jaroj vere ne stagnis, kvankam ni ne ĉiam sukcesis aligi sufiĉe da novaj fortoj kaj novaj personoj.

Se iu ajn volas, jam ekzistas multaj prisemitaj kampoj, al kiuj eblas aliĝi kaj helpi.

En la nomo de ĈEA-komitato ni sincere dankas al ĉiuj, kiuj iamaniere kontribuis al la atingiĝoj.

Nur skize kaj esperantlingve mi ripetas prioritatojn por venontaj 2 jaroj aprobitaj dum la XIV-a kongreso 2014 en Prostějov:

- Esperanto-Muzeo en Svitavy,
- laŭ eblecoj teni ekvilibrigitan budĝeton,
- projektoj pri ciferecigado kaj voĉregistrado (de E-materialoj),
- alirebligado de la muzea biblioteko kaj de ciferecigitaj materialoj al membroj kaj publiko.

Vicordo ne estas grava, same kiel starigitaj prioritatoj tute ne signifas, ke por aliaj celoj aŭ unuopaj projektoj ne restos loko, forto kaj eventuale eĉ mono. Nenio utila estas flankenmetita, sed inter prioritatoj aperis en ĝeneraliga formo temoj, kiuj ne startas de la komenco kaj ni vidas en ili iun perspektivon kaj gravecon.

Se troviĝos novaj unuopaj projektoj aŭ ĝeneralaj temoj, por kiuj samtempe ekzistos gvidantoj aŭ kunordigantoj, ni volonte semu kaj kultivu novan grundon. Mi persone bedaŭras, ke pro diversaj kialoj multo restas por kunlaboro kun aliaj organizoj ene de Ĉeĥio kaj ene de Esperanto-movado inkl. gravaj UEA aŭ EEU, kie ĈEA estas pli „surpapera“ gasto kaj de-temp-al-tempa observanto.

La devizo por venontaj jaroj restas la sama: **ASOCIO NE EGALAS AL KOMITATO.**

Ĉiujn salutas kaj invitas al plua kunlaboro

Vladimír Dvořák, ĈEA-prezidanto

P.S.

Ĉi-artikole mi priskribis miaokule nur prioritatojn prezentitajn dum la kongreso 2011 kaj ties 3-jaran plenumadon.

Kompleta agadraporto pri la 3-jara periodo kun raporto pri mastrumado kaj budĝeto aperos en Starto 2015/1.

KAEST 2014

La ĉi-jara Kolokvo pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (2014-11-13/16, Modra apud Bratislava) estis dediĉita precipe al bibliotekoj kaj arkivoj, sed okazis tie ankaŭ Aktivula Maturiĝo (AMO).

Marek Blahuš parolis pri ciferecigado de Zamenhofaj adresaroj, Detlev Blanke pri biliblioteko kaj arkivo sub ŝtata protekto en Germanio, Peter Baláž prezentis aktivecojn de [E@I](#) en la kampo de edukado, Petr Chrdle rakontis pri Esperanto-muzeo en Svitavy kaj gvidis diskutgrupon pri E-bibliotekoj, pri maniero de pruntado kaj protektado kontraŭ ŝtelado de pruntitaj libroj.

Tuider Bernhard priskribis, kiamaniere zorgas pri libroj kaj arkivaĵoj la viena muzeo kiel profesia institucio apartenanta al Nacia Aŭstra Biblioteko. Miroslav Malovec klarigis, kiamaniere li klopodas arkivi materialojn en amatoraj kondiĉoj. Zsófia Koródy prezentis bibliotekon en Herzberg am Harz (Esperantourbo) kaj Ján Vajs la Slovakian Esperanto-arkivon. Wera Blanke parolis pri faraono Eĥnetono kaj lia arkivo, kiu transvivis 3000 jarojn, ĉar ĝi estis skribita sur argilaj bakitaj tabuloj.

Aktivulan Maturiĝon gvidis Eva Fitzelová kun Johannes Mueller (pri podkastoj), Mélanie Maradan (optika signorekono kaj tekstarpurigo), Michal Matúšov (Vikipedio), Vladimír Türk (redaktebla skanaĵo) kaj Václav Zouzalík (interretaj arkivoj). AMO fine rekomendis al UEA kunordigi la ciferecigajn projektojn kaj faciligi la kunlaboron per klaraj gvidiloj kaj helpi al verkistoj solvi problemojn pri kopirajto.

Aperis prelegoj ankaŭ pri tekstokontroliloj, kemiaĵoj en manĝaĵoj, pri

grotoj, astroj, slava religio, kiel verki artikolon por Scienc Revuo, Esperantolibroj en publikaj bibliotekoj en Germanio, Problemoj de transliterumo kaj latinigo de rusa lingvo, Arkivado – provo krei manlibron por nefakuloj. Espereble ĉio aperos en libroforma prelegaro.

Jozef Reinvart klarigis kiel Slovakio malfermis Nacian Konvencion pri EU, kiun sekvis ankaŭ Ĉeĥa Respubliko sur nivelo de la registaro. Li informis ankaŭ pri klopodo, ke poloj metu Esperanton en liston de Nacia Heredaĵo (kio vere okazis unu semajnon post KAEST).

Solena momento de la aranĝo estis transdono de Premio Deguĉi al Stano Marček, pro lia tutviva laboro por Esperanto. Sekvis komuna fotado.

Ĉefa organizanto estis Peter Baláž kun sia teamo de volontuloj. El Ĉeĥio partoprenis ankaŭ Margit Turková, Jindřich Košťálek, Vít Mišurec kaj Karel Votoček. Krom prelegoj atendis ĉeestantojn ankaŭ vingustumado, filmetoj, iom da muziko.

Post KAEST dimanĉe posttagmeze okazis unua kunveno de organizantoj de UK 2016 en Nitra. Stefan McGill kiel reprezentanto de UEA diris, ke 100 kongresoj realiĝis kvazaŭ laŭ sama ŝablono kaj ke slovakoj estu kuraĝaj kaj ne timu fari la 101-an kongreson alimaniere, konvene al la moderna tempo.



Václav Zouzalík prezentas retajn arkivojn.

Bartošovice

En la tagoj 31. 10 – 2. 11. 2014 okazis en la moravia-silezia regiono en la kastelo de Bartošovice jam la 3-a Internacia Esperanto-lernejo.

La partoprenantoj povis perfektigi sian Esperanton en la kurso por progresintoj, la komencantoj konatiĝis kun la fundamentoj de la lingvo.

La kursojn gvidis spertaj lektoroj el Slovakio.

La seminarion partoprenis ankaŭ esperantistoj el Hongkongo, Svedio, Anglio kaj Aŭstrio. Tiuj ĉi amikoj estis tre okupitaj per respondado de niaj ofte tiklaj demandoj. Ekzercante Esperanton ni eksciis multon novan el iliaj landoj. Inter ni festis sian naskiĝtagon 14-jara aŭstro Jan Kozousek, ricevis torton kaj donacetojn. Li parolis Esperanton sufiĉe bone.



Jan Kozousek kun la gepatroj

Ĉino rakontis pri novjara festado en Ĉinio. Ni rekomendis, ke li ne forgesu gustumi niajn ĉeĥajn knedlikojn (pastobulojn). Nia biero plaĉis al li tre multe. Svedino parolis pri lingvostudado kaj surprizis nin per bonega scio de la ĉeĥa lingvo. La anglo ekzercis konversacion.

En sunplena aŭtuna tago ni uzis liberan tempon por rigardi amasan fiŝkaptadon en proksima fiŝlago. La lokaj civitanoj foriris kun aĉetitaj fiŝoj hejmen, ni gustumis ĉe standoj, kiuj borderis la fiŝlagon aŭ staris antaŭ la kastelo. Nia apetito kontentis.

En la standoj oni ofertis ne nur fiŝojn kaj konsum-varojn, sed ankaŭ specialajn tradiciajn lokajn kukegojn, nomatajn „frgály“.

Ni admiris ofertatajn Kristnaskajn ornamaĵojn kaj ilian preparon surloke.

La vesperan programon certigis denove la grupo NO PROBLEM. Ili kantis ne nur ĉeĥe, sed ili lernis ses kantojn ankaŭ en Esperanto, kiujn ili publikigis per kompakta disko, kiun ni tuj povis aĉeti.

La vespero finiĝis per kantado akompanata de gitaro.

La dimanĉa antaŭtagmeza instruado rapide pasis.

Jana Křížková



La aŭtorino kun la honkonga gasto

fotis J. Čejková kaj L. Chaloupková

ESPERANTO KAJ KOLEKTADO

Jen titolo de la nova tutjara tema ekspozicio, inaŭgurita la 27-an de septembro 2014 en la Esperanto-Muzeo en Svitavy. Ĉar la evento okazis ĝuste post la rekta limdato de nia lasta numero, ni alportas pli precizajn informojn nur nun. Ĝia postulhava realigo okazis en kunlaboro de la Muzea kaj ekspozicia grupo de ĈEA kun membroj de la loka Klubo de amikoj de Esperanto. Ilin ambaŭ gvidas Libuše Dvořáková, sur kies ŝultroj pendis dumjare la plej granda laborŝarĝo.

La temo estis elektita kongrue al la Tutŝtata filatela ekspozicio, kiun Asocio de ĉeĥaj filatelistoj okazigis 25.-28.9.2014 en la Urba Muzeo kaj Galerio Svitavy, do ambaŭ inaŭguroj estis planitaj samtempe. En la organiza teamo aktive laboris nome de esperantistoj Libuše Dvořáková. Temis pri bona okazo por diskonigi Esperanton inter filatelistoj, ĉar en la nekonkursita parto de la filatela ekspozicio estis prezentita ankaŭ ekspoziciaĵo "Historio de Esperanto" de Alois Jakubec, prezidanto de E-klubo en Hranice. Informoj pri Esperanto kaj pri nia muzeo aperis ankaŭ en ekspozicia katalogo. Menciindas, ke Ĉeĥa Poŝto tiukaze eldonis specialan poŝtmarkon desegnititan de Pavel Rak kaj poŝtkarton, kies aŭtorino estas Mirka Tomečková.

La inaŭguron de nia tema ekspozicio salutparolis reprezentanto de la Asocio de ĉeĥaj filatelistoj kaj gimnaziestro Milan Báča kaj reprezentantoj de Esperanto-asocioj de Nederlando (H. Adriaanse, parolinta ankaŭ nome de UEA), Slovakio (P. Holba) kaj Aŭstrio

(W. Spielhofer). La tuttagan inaŭguran programon, kiun partoprenis ĉ. kvardeko da gastoj, finis vespera projekciado de P. Polnický pri Malajzio, Tajlando kaj Singapuro.

La ekspozicio sur enkonduka panelo kaj aldonaj vitrinoj prezentas historion kaj nuntempon de kolektado en Esperantujo, ties gravajn asociojn, gazetojn kaj eventojn. Ĝi celas montri al la publiko utilecon de Esperanto dum ligado de eksterlandaj kontaktoj kun samhobianoj. Sume prezentiĝas dum ĝi 15 ekspoziciantoj el tuta Ĉeĥio, Kroatio kaj Francio kaj ekspoziciaĵoj el pli ol 40 landoj. La unua parto prezentas kolektmaterialojn kun Esperanto-temaro (filatelo, poŝtkartoj kaj insignoj de V. Kaprál, filatelo kaj insignoj de K. Franc, medaloj de V. Kočvara, glumarkoj kaj kalendaroj de P. Polnický, historiaj bildkartoj kaj filatelo de J. Dubinová, bildkartoj kun kongresaj stampoj de J. Křížková kaj certe nelastvice bildkartoj el Esperantujo de sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio Zlatko Tišljár.

Por vigligi la tuton, ĉeestas ankaŭ la kategorio "Kion kolektas esperantistoj", al kiu kontribuis Libuše kaj Pavel Dvořáková (historiaj bildkartoj de Svitavy), Miroslav Sýkora (geokaŝado), Zdenka Novotná (pupoj el la tuta mondo), Jan Šebetovský, membro de Ĉeĥa Esperanto-Junularo el Prago (bierpletoj). La plej malavara liveranto de ekspoziciaĵoj estas Esperanto-amiko kaj subtenanto (kvankam ne parolanto) Jan Richtr, prezidanto de la Asocio Brontosaurus Svitavy, kiu en nia muzeo organizas por la publiko regulajn vojaĝprelegojn.

Li prezentas nur etan eron el siaj modelaj kolektoj de moneroj kaj bankbiletoj de la mondo, temaj alumetglumarkoj, telefonkartoj kaj ankaŭ de komunuzaj objektoj, kiuj rapide pereas - pakkovraĵoj de eksterlandaj teoj, pudingoj kaj jogurtoj. Do sendube la ekspoziciaĵoj estas tre variaj kaj eĉ nekolektemuloj tie trovos ion laŭ sia plaĉo. Krome aparta panelo prezentas temon "Famaj esperantistoj kaj Esperanto-favorantoj sur kolektmaterialoj" (Tolstoj, Verne, pluraj Nobelpremiitoj, la unua hungara kosmonaŭto k.a.); en foliumebla dosiero vi trovos elekton de grandigitaj kopioj de poŝtmarkoj kun Esperanto-temaro ekde 1926 ĝis 2013. Apuda tablovitro dokumentas kuriozaĵojn pri "Historio de Esperanto-movado sur kolektmaterialoj". Informmaterialoj por tiuj partoj estis parte kolektitaj ankaŭ danke al interretaj kontaktoj kaj kolektoj de la organizo ELF-AREK kaj esperantistoj el Brazilo, Rumanio, Francio kaj aliaj landoj. Komplete aktualigita estis ankaŭ librovitroj, kie vi povos vidi i.a. librojn, katalogojn kaj gazetojn el historio de la organizita Esperanto-kolektado kaj konatiĝos kun ĝiaj elstaruloj. La muzeo prezentas ankaŭ aktivecon de esperantistaj blinduloj kaj specimenojn de libroj nove akiritaj per interŝanĝo kun eksterlandaj Esperanto-bibliotekoj kaj centroj (Vieno, Herzberg, Aalen kaj Gray en Francio). Tri fotogaleriojn rilate al la ekspozicio vi povas trarigardi en

<http://www.muzeum.esperanto.cz/cs/galerie>

(ĜIS) KIAM KAJ KIEL VIZITI LA MUZEON?

La temo de la sekva inaŭguro ne estas ankoraŭ fiksita, sed tiu ĉi ekspozicio

estos vizitebla plej probable minimume ĝis la 15-a de majo 2015 - ankaŭ dumvintre, marde ĝis sabate (9-12h kaj 14-22h) - dimanĉe nur laŭ antaŭa interkonsento. Simbola enirbileto kostas nur 10,- Kč (CZK) - malpli ol duoneŭron. Ĉar ĈEA kunlabore kun la Esperanto-klubo Svitavy prizorgas la muzeon plene volontule, tial ĝi ne disponas pri plentempe pagata kaj ĉiam ĉeestanta deĵoranto. Se vi deziras renkontiĝi kun la lokaj esperantistoj aŭ almenaŭ havi ĉiĉeronan klarigon en Esperanto, bv. antaŭe skribi al svitavy@esperanto.cz aŭ telefoni al 604 377 616.

Pliajn informojn vi trovos en <http://muzeo.esperanto.cz>, kie vi povas sekvi ankaŭ Aktualizaĵojn pri la muzeaj aktivecoj. Ni ĝojos, se vi diskonigados la muzeon kaj la ekspozicion inter viaj geamikoj (ĉu esperantistoj eksterlandaj, ĉu neesperantistoj-kolektantoj). La muzeo estas nia komuna projekto kaj ankaŭ ĝia vizitateco influas ĝian pluan futuron! Ĉiukaze la urbo Svitavy kaj ĝia ĉirkaŭaĵo havas multon por oferti.

Ni aprezas kaj antaŭĝojas vian intereson kaj kunlaboremon!

Dankante al ĉiuj ekspoziciantoj kaj organizaj helpantoj elkore invitas vin

Pavla Dvořáková, ekspoziciestro



foto la aŭtorino

KOMENIUS - ZAMENHOF

La Vojo al Harmonio

Jaroslav Karhan (daŭrigo)

De vi do dependos, ĉu la mondo havos fortikan pacon aŭ ĉu ni havu nur kelktempan silenton, kiun baldaŭ denove interrompos diversaj eksplodoj de intergentaj bataloj aŭ eĉ novaj militoj.

Zorgu do, ke via laboro ne estu sencela kaj senfrukta, ke post fino de viaj laboroj la homaro ne povu diri: ni vane elportis la grandegajn kaj terurajn oferojn...»

Denove li prilaboradis eĉ sian kompleksan vojon al la tuthomara harmonio. Li estis konvinkita, ke ĝia unua ŝtupo – ebliganta unuecon en diverseco lingva – havas firman fundamenton en la tuta mondo, kiu ne pereos. Tial li sentis neceson plene koncentri sian strebadon por kreo de ĝia dua ŝtupo – unueco en diverseco religia.

Tiacele li faris preparojn por kunvoki – tuj post la milito – kongreson por neŭtrala, tuthomara religia fundamento, universale akceptebla. Li kolektadis por ĝi materialojn kaj preparis alvokon kun tiuj ĉi ĉefaj ideoj:

«...Lasante al ĉiu homo plenan liberecon havi tian internan kredon, kiu ŝajnas al li la plej bona, ni proponas krei neŭtralan eksteran kadron, kiu povus etike, more kaj komune unuigi inter si ĉiujn memstare pensantajn homojn, sendepende de tio, kia estas la filozofie-teologiaj kredoj aŭ hipotezoj de ĉiu el ili.

Ni proponas starigi neŭtrale-homan etikan regularon, kiu povus fari el homoj homojn kaj forigus la abomenindan gentan ŝovinismon, la malamon kaj maljustecon inter la gentoj...»

Plue li disvolvis principojn de sia homaranismo kaj precipe dediĉas sin al problemo de edukado de infanoj – la bazon de pluaj generacioj. Li deduktas, ke infanon ne eblas nutri per abstraktaj teorioj kaj reguloj. La infano bezonas impresojn kaj sentoplenan, harmonian medion ne nur familian, sed eĉ pli vastan. Tiacele plej taŭgas edukado religia kaj plej diversaj religiaj travivaĵoj.

Li proklamas: «Infano, edukata sen religia sento, neniam povas havi en sia koro tiun feliĉon, tiun varmon, kiun al aliaj infanoj donas la preĝejo, la tradiciaj moroj, la posedado de 'Dio' en la koro. Ĝi estas tro malriĉigita...»

Sed li atentigas, ke la religia edukado – jam en infanaĝo – estu farata laŭ elementaj principoj de homaranismo. Alie ekestas sufiĉe granda versimileco, ke en plenaĝo – kun malfortigado de kredo en dogmoj – komencos malaperadi eĉ kun ili ligita kredo je Dio kaj tiamaniere eĉ ĝusta orientiĝo por la harmonia vivo.

Nome, homaranismo – okaze perdo de kredo en dogmoj – savas tion la plej gravan: kredon en Dion, kiu – laŭ ĝiaj principoj – troviĝas en la baza religia kerno, ensemita en la homa koro.

Krome: ĝi kreas konvenajn kondiĉojn, por ke en koro de ĉiu homo tiu ĉi kerno ekĝermu kaj el ĉiu elkresku arbo de ĝusta vivo kun fruktoj de ĉiuflanka harmonio...

Tiu ĉi kongreso por la baza, tuthomara, religia fundamento – kiun Zamenhof intencis kunvoki tuj post la unua mondmilito – ne celis do anstataŭigi la religiojn ekzistantajn.

Li volis nur, ke ĉiuj religioj prilaboru la proponitan koncepton de universala, religie-etika fundamento kaj komune – en definitiva formo – prezentu ĝin al la tuta homaro por ĝenerala akcepto. Tiamaniere li volis kontribui al pli bona, pli justa postmilita vivo kaj precipe preventi pluajn militojn...

Sed tiuj ĉi liaj planoj jam ne efektiviĝis... Lia grava kormalsano kaj streĉiĝoj de la unua mondmilito plirapidigis lian foriron. Li mortis en la pola ĉefurbo Varsovio, la 14-an de aprilo 1917, en aĝo de 58 jaroj. Entombigita li estis en la varsovia tombejo, la 16-an de aprilo 1917.

Kia tragedio de lia vivo: li mortis en malamikeca stato inter nacioj, kiun li volis – per siaj projektoj lingva kaj religia – por ĉiam malebligi.

Senpere antaŭ sia morto li esprimis ankoraŭ sian lastan deziron, ke lia universala koncepto religie-etika estu realigita – en iu ajn alia, nova formo – por ke la militteruraĵoj, en kiuj li mortis, neniam plu ripetiĝu...

Bedaŭrinde ankaŭ tiu ĉi lia lasta deziro ne plenumiĝis... Male, eksplodis la dua mondmilito, multe pli terura, en kiu pereis granda parto de liaj familianoj...

La svisa profesoro D-ro Edmond Privat, en sia libro «Vivo de Zamenhof», el j. 1920, i.a. skribas:

«Zamenhof amis nin ĉiujn. Li postlasis al ni testamenton: konatigi la tutan homaron kun lia kompleta verko – la kompleksa vojo al tuthomara harmonio. Li batalis por bono kaj belo, sed la tasko restis ne plenumita. Kiu daŭrigos ĝin? Kiu plenumos lian deziron? Nova mondo devas konstruiĝi. Ĝi bezonas Absoluton. Homo sopiras je likvido de baroj... La

estonteco pruvos ĝustecon de la kompleksa idearo de Zamenhof.»

3. KOMUNA VOJO AL HARMONIO

Ni konatiĝis kun la vivoj de Johano Amos Komenius (1592-1670) kaj Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917), kiuj havas multajn komunajn karakterizojn:

Ambaŭ ege suferis pro grandaj malfacilaĵoj en siaj propraj vivoj, tamen dediĉis sian tutan energion ankaŭ al plibonigado de aferoj homaj, precipe al preparado de universala vojo al la tuthomara harmonio.

Al ambaŭ fajro neniigis iliajn valorajn – pene prilaboritajn – manuskriptojn, tamen ili ne malesperis, sed konstante venkadis multajn obstaklojn kaj ĉiam denove komencadis fervore labori, por daŭrigi plenumadon de siaj vivmisioj...

Ambaŭ konstatis, ke kerno de ĉiuj malfacilaĵoj en la mondo konsistas en celado al aferoj supraĵaj – sen atento de ilia interno kaj enhavo – eĉ en homa facilanimeco.

Ambaŭ konvinkiĝis, ke la prakaŭzo de la tuthomara malakordo baziĝas en sferoj religia kaj lingva, kies multvarieco kaŭzas tuthomaran nekomprenemon spiritan kaj eĉ malebligas interkompreniĝon lingvan.

Ambaŭ tial – serĉante vojon al la kompleksa, tuthomara harmonio – dediĉis apartan atenton al kreo de elementa, universale akceptebla unueco en diversecoj religia kaj lingva. Tiu ĉi ideo fariĝis bazo de ilia vojo al la tuthomara harmonio.

(daŭrigota)

Pri la libro „Život Andreo Cseha“

Miaj eksterlandaj amikoj ŝatas donaci al mi librojn, origine verkitajn en Esperanto. La libroj estas por mi interesaj ĉefe pro tio, ke ili estas "literaturo de faktoj". Tial ili estas por mi fonto de mia edukado pri la monda historio ĝenerala, eĉ pri la historio de mia naskiĝlando (kvankam ne el plumoj de ĉeĥaj aŭtoroj). La librojn mi ŝatas tiel, ke mi komencis ilin traduki en la ĉeĥan lingvon, kvankam mi scias, ke apenaŭ ili povas aperi paperforme.

Tamen mi opinias, ke kelkaj, kiujn mi posedas, estas la kerno de la esperanto-literaturo kaj valoras esti publikigitaj al ĉeĥa legantaro.

Tial mi tradukis la libron de Ulrich Lins "La danĝera lingvo"... Poste mi kaptis la informon, ke Jules Verne komencis skribi romanon pri esplorvojaĝo al Afriko, kies partoprenantoj scipovis paroli la internacian lingvon Esperanto. De ĝi mi multon eksciis pri la agado de blankuloj en Afriko, spite ke la romano ne estis (pro forpaso de J.V.) finita, restis nur 5 ĉapitroj...

Facile mi tradukis la libreton de Julio Baghy "Verda koro", liajn travivaĵojn el kruda Siberio. Poste mi kolektis 60 fabelojn el la tuta mondo... Finfine mi tradukis la libron pri Zamenhof kaj liaj lingvoklopodoj kaj movadstreboj, de la francaj aŭtoroj Centassi kaj Masson, kiun mi eldonis paperforme, mem-koste..

La libron „Vivo de Andreo Cseh“ mi ankaŭ ricevis de franca amiko kun subskribo de la aŭtoro: Ed Borsboom,

nederlandano. Sufiĉe dika libro de aŭtoro, kiu Andreon persone konis, priskribas eŭropan historion el tre interesa vidpunkto. Mi la libron ekamis pro multaj kazoj.

Andreo naskiĝis en la sama jaro kiel mia avino, patrino de mia patrino (1895). La familio de Cseh (avo de Cseh devenas el Bohdaneč proksime de Pardubice) havis radikojn ĉeĥajn... Mi povis per la libro ekscii kiel ŝanĝadis limoj en Eŭropo dum la unua kaj la dua mondmilitoj. Kaj ĉefe ekkoni evoluon de esperanta movado mem. La persono de Andreo estas vere interesa. Li naskiĝis en Transilvanio, kie popolo, simile kiel en Bialistoko, estis diversnacia. Lia laboro por esperanta movado estis grandega, sed persona vivo spite de vico da sukcesoj estis malfacila, ĉar li defiis multajn malfacilaĵojn.

Kiam mi petis aŭtoron Ed Borsboom pri aŭtoraj rajtoj, li ĝojis pri mia intenco traduki la libron kaj eĉ volis iel subteni la tradukon, li eĉ trovis por mi ĉeĥan korektanton, sed poste ni interkonsentis pri nura interreta formo, ĉar verŝajne la libro ne alportus profiton al eldonisto. Mi pensas, ke multaj niaj esperantistoj ne povas legi la libron en origina formo, krome mi kaj korektanto posedas ununuran ekzempleron de la libro en Ĉeĥio.

Se iu ne povas aĉeti la librojn, kiuj troviĝas en www.bezvydavatele.cz, oni povas peti spertulojn por printi eĉ papere plurajn librojn, kiujn mi tradukis (entute 17) aŭ peti min por sendi la tekston, ĉar mi volonte sendus la libron majle al esperantistoj.

J. Drahotová
drahotova@esperanto.cz

Ĉu Pilseno, Pilsenjo aŭ Pilzeno?

V časopise AEH *Informilo* č. 6 a 9/2007 (*Antaŭen* 3/15) a nyní také v časopise ČES *Starto* č. 2/2014 je pro město Plzeň užit název Pilseno, podle mého názoru nesprávně. Plzeň je české město a v jeho českém názvu je souhláska „z“, zatímco v použitém názvu je souhláska „s“ podle německého názvu Pilsen. Pokládám za samozřejmé, že je třeba esperantský název odvodit od názvu domácího, tedy českého.

Název Pilzeno je již dlouhodobě užíván, např. Kamarýt v knize *Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio* použil Pilzeno. Je také v prestižních slovnících německého lexikografa E. D. Krauseho. Vinu za současnou „oblibu“ germanismu Pilseno přisuzují KRAFTOVU česko-esperantskému slovníku, kde je dubletní tvar Pilsen(j)o. Před časem jsem se ho zeptal proč? Sám autor neví, domnívá se, že mu tento tvar doporučil někdo z jeho spolupracovníků. **Doporučuji, abyste si ve slovníku tvar Pilsen(j)o opravili na Pilzeno.**

A ještě jedno důležité připomenutí: Někdo se může ptát, proč tvar Plzeň neasimilovat na Plzeno. Ne, protože esperantská abeceda má dvě souhlásky označované jako dentály „l“ a „r“ (likvidoj), které jsou v češtině slabikotvorné, v esperantu však nikoliv. V mezinárodním jazyku je třeba respektovat skutečnost, že pro řadu etnik české slabiky „pl“ a také např. „br“ (Br-no) jsou vyslovitelné jen obtížně, protože v těchto jazycích neexistují. Je proto přirozené, že v názvu Pilzeno je do první slabiky vsunuta samohláska, zde oprávněně „i“ podle německého Pilsen a Pils.


Podobná situace je u názvu české řeky Vltava. Absolutně nelze prosazovat asimilovaný název Vltavo. Také proto, že již snad sto let se používá název Vultavo.

Také jsem se setkal s používáním názvu Brno, jako by to byl asimilovaný esperantský název. Někteří esperantisté od názvu Brno odvozují adjektivum Brna, nebo brna, a také slovo brnanoj (Brňané). Je to hrubá chyba. Brněňští esperantisté používají již od počátku 20. století, sice zřídka, název Brunno. Samohláska „u“ se vyskytuje v latinském názvu města, dnes se hojně používá adjektivum „brunensis“.

Ještě poznámka na závěr. Esperantista, jehož jméno neuvádím, mi sdělil: „Proč by se nemohly používat oba názvy, Pilseno i Pilzeno, jak se to komu líbí?“ Zásadně nemohly. Existuje v České republice obec, která má dva oficiální názvy? Neexistuje. A přesto někteří členové esperantského hnutí naivně prosazují všelijaké osobní libůstky. Postih jim za to nehrozí, rozkolísávají však a znevažují tento mezinárodní plánový jazyk.

Resumo en Esperanto: Por la okcidentbohemia urbo Plzeň estas uzata, sporade, la esperanta nomo Pilseno (ekz. en *Informilo* de AEH, en *Starto* de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj ankaŭ en la Ĉeĥa esperanta vortaro de Karel Kraft). Por tiu formo kun la konsonanto „s“ interne ne ekzistas racia kialo. Seriozaj aŭtoroj uzas la **etimologie** defendeblan formon Pilzeno, ĝi estas ankaŭ en la grandaj vortaroj germanaj de E. D. Krause.

J. Werner



Bildo: Invitulo *Pilzeno vokas vin!* 1967.

Aliĝo al UEA utilas! Aliĝo helpas!

Kiam mi laboris en la Centra Oficejo de UEA en la okdekaj jaroj, ni havis inter sep mil kaj ok mil individuajn membrojn. Nun la membronombro ŝvebas ĉe la limo de kvin mil. Samtempe, tamen, Esperanto disfloras inter multaj junuloj tutmonde, kiuj danke al Interreto fariĝis aktivaj lernantoj kaj uzantoj de la lingvo; kaj ankaŭ mankas en niaj vicoj multaj “veteranoj” de la movado. Nia membrovarba kampanjo celas do rekreskigi nian “rondon familian,” kiu praktike kaj simbole konsistigas la kernon de la Esperanto-movado mondscale.

Kial do aliĝi al UEA? Ekzistas multaj bonaj argumentoj por tio. Helpu nin disvastigi ilin—dum landaj kongresoj, ĉe lokaj grupoj, en revuoj, en Facebook, Lernu.net, radioprogramoj kaj en Esperanto-televido. Kaptu ĉiun okazon por mencii, ke vi mem estas membro de UEA. Per via helpo, nia monda asocio povos rekapti la fortojn bezonatajn por fronti la defiojn de la 21^a jarcento!

Per aliĝo al UEA, **oni kontribuas al la tutmonda kresko de Esperanto**. Ĉiujare per siaj diversaj fondaĵoj UEA donas konkretan subtenon al asocioj kaj aktivuloj en Azio, en Afriko, en Ameriko; per tiu agado, nia komunumo fariĝas kulture pli kaj pli riĉa, bunta, inkluziva.

Per aliĝo al UEA, **oni plifortigas la voĉon de la lingvo kaj movado**. Estas ĉefe la reprezentantoj de UEA kiuj argumentas por la valoro kaj aktualeco de Esperanto ĉe UN kaj Unesko kaj en diversaj internaciaj forumoj. Tiu agado ankaŭ helpas krei kondiĉojn por sukcesa informado sur lokaj kaj landaj niveloj.

Per aliĝo al UEA, **oni subtenas instruadon de Esperanto kaj trejnadon de aktivuloj**. Interalie, la AMO-seminarioj de UEA donas rimedojn kaj okazojn por vastigi la konojn kaj kapablojn de homoj sur ĉiuj niveloj de la movado.

Per aliĝo de UEA, **oni esprimas solidarecon kun la mondvasta Esperanto-komunumo**. Ĉiujare UEA subtenas kulturajn projektojn diverslande, venigas homojn al kongresoj kaj seminarioj, kaj membrigas junulojn el malriĉaj landoj por doni al ili senton de aparteno al la internacia komunumo. Ofte la dankmesaĝoj de tiaj junuloj al la CO estas ege kortuŝaj.

Kaj ni ne forgesu, ke **UEA-membreco ankaŭ donas personajn avantaĝojn**. Inter ili aparte menciindas forta rabato al Universalaj Kongresoj, 10%-a rabato en la Libroservo, kaj abono al la Gvidlibro aŭ Jarlibro kaj la revuo Esperanto, papere kaj rete. Por aktiva esperantisto, tiuj estas nemalhaveblaj rimedoj por partopreni en la movado en tutmonda skalo.

Ne mankas argumentoj. Ni disvastigu ilin! Farante tion, tamen ne forgesu pagivan propran kotizon—eĉ ankoraŭ por la jaro 2014! Kaj pagante por la jaro 2015, la jaro de la 100^a Universala Kongreso, memoru samtempe pri la ekzisto de aliaj kategorioj per kiuj oni speciale povas subteni UEA, kiel Societo Zamenhof, Dumviva Membreco aŭ Patronoj de TEJO. Per donacoj al Fondaĵo Canuto vi povas subteni homojn el malriĉaj aŭ nepagipovaj landoj.

Ek al rekorda kresko de nia membraro en 2015!

*Mark Fettes
prezidanto de UEA*

Pli da informoj pri membreco en UEA petu ĉe Petro Chrdle, UEA-ĉefdelegito por ĈR: chrdle@kava-pech.cz

Nova UEA-varbilo

http://www.esperanto-nederland.nl/ned/temp/UEA_varbilo_2014.pdf

Niaj veliloj

Sur la lampoj Konsilio, Kapabligo, Komunumo kaj Kunordigo, UEA organizas trejnadojn, planadojn kaj kunagadojn tutmonde. Strategia Bazo kaj Strategia Laborplano donas komunajn kadron kaj direkton.

Por pliaj informoj:

uea@co.uea.org
www.uea.org
www.facebook.com/
Universala Esperanto-Asocio
www.youtube.com/UEAeva

Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 GJ Rotterdam
Nederland
tel. +31 10 436 1044
fakso +31 10 436 1751

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
estas la gvida velilo de la
tutmonda Esperanto-movado.

UEA kaptas
freŝan venton.
Kunvelu kun ni!

Kiel membro de UEA...

vi kontribuas al la tutmonda kresko de Esperanto
UEA subtenas la movadon en multaj landoj kaj
kunordigas la regionajn agadojn tutmonde.

vi partoprenas la voĉon de la lingvo kaj movado
UEA reprezentas la movadon de UN kaj ŝtatoj kaj
plenas por justeco kaj egaleco sur la lingva kampo.

vi subtenas la efikan instruadon de Esperanto
UEA aldonas modernajn lernilojn, akcipias ekzamenojn
kaj donas financajn subtenojn al ILEI kaj aliaj kunlaborantoj.

vi kunaktivas por Esperanto kaj daŭrigo de la mondo
UEA donas multajn rimedojn kaj okazojn por vastigi la
konceptojn kaj kapablojn de aktivuloj.

Konkrete, de UEA vi ricevas:

- revuojn (Esperanto kaj Kontakto), kiu traktas aktualajn temojn de la movado kaj la monda socio;
- kongresojn, kie esperantistoj el la tuta mondo kunas kulturamas, klerigas kaj kunplanas la agadon;
- aktivajn retojn kaj servojn pri ĉio ekde libroj ĝis labiado.

Esperanto oficiale fariĝis nemateria kultura heredaĵo de Pollando

La 20-an de novembro prof. Małgorzata Omilanowska, la pola ministro pri kulturo kaj nacia heredaĵo, aprobis lokigon de la lingvo Esperanto sur la "Polan liston de nemateria kultura heredaĵo".

Tio estas rezulto de klopodoj iniciatitaj de Edmund Wittbrodt, membro de la pola senato, kaj s-ro Kazimierz Krzyżak, estrarano de la Pola Asocio Eŭropo-Demokrato-Esperanto (EDE-PL).

La nuna sukceso estas antaŭkondiĉo por proponi al UNESKO enlistigi Esperanton sur la "Reprezantan liston de nemateria kultura heredaĵo de la homaro".
laŭ RET-Info

Esperantistoj en la ĉeĥa Vikikonferenco en Brno

Sabate la 29-an de novembro 2014 okazis en Stelobservejo kaj Planetario de Brno la tutŝtata Vikikonferenco de la komunumo Vikimedia Ĉeĥio. Kvankam ĝi estis pri la ĉeĥa Vikipedio por ĉeĥaj vikipediistoj kaj en la ĉeĥa lingvo, oni tie sufiĉe multe parolis ankaŭ pri Esperanto.

Inter la ĉefaj organizantoj estis Marek Blahuš, inter la prelegantoj Václav Zouzalík kaj la enkonduka programero estis intervjuo kun Miroslav Malovec, fondinto de la ĉeĥa Vikipedio per traduko el Esperanto. Lin poste en la vestiblo intervjuis ankaŭ redaktorino Tereza Kadroňková de Ĉeĥa Radio.

Ankaŭ inter la spektantoj estis pluraj esperantistoj, slovako Matej Grochal kun Radoslava Semanová, el Brno Marie Malá, Josef Vojáček, Martin Sedlák kaj Vladislava Havlíčková, kiu aktive partoprenis en kvizo, preparita de Marek Blahuš laŭ modelo antaŭe de li elprovita en Esperanto-aranĝoj.



foto: CC-BY-SA Martin Strachoň / Wikimedia Commons

La konferenco emfazis, ke prof. Jan Sokol rekomendas al pensiuloj aktive kontribui al Vikipedio, ĉar tiamaniere ili povas transdoni siajn sciojn kaj spertojn al la juna generacio.

Vidu Aktualizaĵojn ĉe www.esperanto.cz.

-mm-

Lingvo.info

estas retejo, kiu uzas Esperanton por absolute praktika celo, nome por konigi la lingvojn de Eŭropo. La ĉeĥa versio havas adreson <http://lingvo.info/cs> kaj donas informojn pri 28 lingvoj inkluzive de Esperanto, pri lingvistikaj fakoj kiel interlingvistiko kaj sociolingvistiko, prezentas ludon pri lingvoj k.s.

Konferanseo

Tiu ĉi vorto mankas en Esperanto-vortaroj, eĉ en PIV, kaj tamen ĝin konas ĉiu, kiu trastudis la internacian lernolibron de William Auld **Paŝoj al plena posedo**. La lernolibro aperis jam en 7 eldonoj, estas havebla ĉe libroservo de UEA kaj ankaŭ rete. Ĉiu paŝo (leciono) prezentas rakonton, poemon aŭ artikolon, post kies tralego la studanto devas respondi kontrolajn demandojn. Novaj vortoj estas klarigitaj esperantlingve. En la 21-a paŝo oni trovas bonhumoran rakonton de bulgara aŭtoro Vasil Conev *Konferanseo*, kies babilema heroo rakontas, kiel li konferanseis grandan vesperamuzon en la salonoj de la novkonstruita modela restoracio. Klarigo en la libro: **konferanseo** - progamestro. Estas necese kompletigi la vortarojn.

HUMPHREY TONKIN 75-JARA

La 2-an de decembro festas sian 75-an datrevenon prof. Humphrey Tonkin, eksa prezidanto de UEA kaj TEJO. Tonkin, kiu esperantistiĝis en 1956, estis estrarano de TEJO de 1961 ĝis 1971, de 1969 ĝis 1971 kiel prezidanto. En tiu periodo li fondis la revuon *Kontakto* kaj estis ĝia unua redaktoro. En 1974 li fariĝis prezidanto de UEA, kiun funk-

cion li plenumis ĝis 1980 kaj denove de 1986 ĝis 1989. De 2001 ĝis 2004 li estis vicprezidanto de UEA.

Tonkin estas Honora Prezidanto de TEJO kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Li estas ankaŭ longtempa direktoro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ekde 2002 li estas prezidanto de la komisiono pri la Belartaj Konkursoj de UEA.

Tonkin aktivas ankaŭ kiel aŭtoro, tradukisto kaj recenzisto, kaj li estas ŝatata oratoro kaj preleganto. Fakulo pri Ŝekspiro, li ofte prelegis pri lia verkaro, interalie en la Internacia Kongresa Universitato. Li ankaŭ esperantigis la dramojn *La vivo de Henriko Kvina* (2003) kaj *La vintra fabelo* (2006) de Ŝekspiro.



Okaze de la 70-a datreveno de Tonkin UEA eldonis la festlibron [La arto labori kune](#) (red. Detlev Blanke kaj Ulrich Lins) kun artikoloj de 100 aŭtoroj. La impona, 900-paĝa verko estas ankoraŭ [aĉetebla](#) ĉe la Libroservo de UEA. [Filmo](#) pri la transdono de la libro al Tonkin estas videbla en la Reta Kinejo de UEA.

laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA

El Esperantujo

■ En Indonezio oni parolas 250 lingvojn. La tiea oficiala lingvo estas la **Bahasa Indonesia**, kiu estas elformita ekde 1928. La Bahasa Indonesia estas nenies gepatra lingvo, sed ĝi estas oficiala lingvo, devige instruata en la lernejoj. Hejme ĉiu indoneziano uzas sian gepatran lingvon, sed en la ĉiutaga laboro, televido, gazetaro, parlamento oni parolas tiun ĉi „interinsulan lingvon“.

■ Klopodojn pri starigo de Esperanto kiel **dua fremda lingvo** ekde la 7-a klaso en ĉeĥaj lernejoj eblas sekvi ĉe:

http://www.literatura.bucek.name/ilei/dr_uhyjazyk.html

■ **Historio de Esperanto en Lanškroun** estis prilaborita de Jana Křížková por la Memoro de Ĉeĥa Esperanto-movado

■ **Internacia Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-a Universitato** kolektis dum unu jaro de ekzistado tridek mil kolektaĵojn kaj fariĝis bazo de instruado, esplorado kaj propagando de Esperanto en Ĉinio.

■ **Vivanta lingvo de vivanta komunumo** estos kolokvo en la Chaux-de-Fonds (27.2.-2.3.2015) – prelegos Christer Kiselman, Giorgio Silfer, Carlo Minnaja, Sabine Fiedler, Perla Martinelly. Info: kce@esperantio.net

■ **Esperanto-biblioteko en Hezberg** en la publika urba biblioteko ricevos 70 m da librobretaro por libroj kaj binditaj gazetoj. Simile oni serĉas lokon por blindula biblioteko el Roterdamo. En 2015 oni uzos iaman bazan lernejon kiel arkivejon de E-materialoj. La projekto serĉas sponsorojn kaj helpantojn.

■ **Pasporta Servo** reviviĝis en la reto:

<http://www.pasportaservo.org/>

En 2015 aperos ankoraŭ la klasika papera eldono.

■ **Komikso Doktor Esperanto** de de-segnisto Daniel Baum kaj aŭtoro Andrzej Kłopotowski aperis en Bialistoko, prezo 20 zlotoj, vidu retejon:

www.centrumzamenhofa.pl

■ Nova Kristnaska kompakta disko de la grupo La Talpoj aperis ĉe Vinilkosmo www.vinilkosmo.com

NI KOMPLETIGAS NIAN VORTPROVIZON

1. Kristnasko

koleda (*píseň*) kristnaska kanto, karolo

koleda (*koledování*) petkantado

koledník petkantanto

půlnoční mše noktomeza meso

varhany orgeno

Betlém Betlehemo

betlémská hvězda betlehema stelo

betlém (*jesličky*) kripeto

stáj stalo

pastýř paŝtisto

Ježíšek, Jezulátko Jesu(-)infano

svátky festoj:

Štědrý večer Kristnaska vespero, Antaŭkristnaska vespero, vespero antaŭ Kristnasko, sankta vespero

Hod Boží (25.12.) Kristnasko, Kristnaska festo, Festo de Kristnasko

svatí sanktuloj:

Svatý Mikuláš Sankta Nikolao

Svatý Štěpán Sankta Stefano

výzdoba ornamado:

vánoční stromek Kristnaska arbeto, Kristarbo,

smrk piceo, **borovice** pino, **jedle** abio

ozdoba ornamaĵo, **vosk** vakso, **sláma**

pajlo, **prskavka** petardeto, **svíčka**

kandelo, **skořápka** nuksoŝelo, **svícen**

kandelingo, **řetěz** ĉeno, **adventní věnec**

adventa florkrono, **jmelí** visko, **rolnička**

tintileto

Pavla Dvořáková

KALENDARO 2014

2014-12-13 Marcipana Kristnasko en Svitavy kaj Tago de tabulludoj en Esperanto-Muzeo, 13-17h,
Info: svitavy@esperanto.cz

2014-12-13 Renkontiĝo de nevidantoj en Olomouc
Info: priborsky@volny.cz

2014-12-29 Esperanta Silvestro en Česká Třebová
Info: jk.esperanto@seznam.cz

2015-04-20/26 Printempa seminario en Skokovy
Info: drahotova@esperanto.cz

2015-04-23/26 La 10-a Sabla Printempo en Skokovy

2015-05-(??) Renkontiĝo kun d-ro Max Kašparů en Svitavy
Info: svitavy@esperanto.cz

Info: pavla.dvorakova@esperanto.cz

2015-06-14 Tradicia Grimpado al Granda Ĉantorio
Info: suchanekj@seznam.cz

2015-07-24/08-02 Busekskurso al la 100-a UKo en Lille
Info: aeh@esperanto-aeh.eu

2015-09-05 La 9-a Postferia renkontiĝo en Netolice
Info: pisek@esperanto.cz

2015-12-05 Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek
Info: pisek@esperanto.cz

Datoj de ĈEA-kongreso kaj de inaŭguro de la nova ekspozicio en Esperanto-Muzeo estos sciigitaj en la numero 2015/1.

MIGRA EKSPOZICIO "Ĉu Esperanto estas morta lingvo?" okazos ĝis 31.12.2014 en Urba Biblioteko Uherský Brod, Kaunicova 77 kaj en januaro-februaro 2015 en Urba Biblioteko Olomouc, filio 08 en la str. Brněnská 80-82.

Jana Hrdličková-Cíhová

(1923-2014)

La 15-an de junio 2014 forpasis honora membrino de ĈEA Jana Cíhová, konata kiel poetino, tradukantino kaj radio-parolistino. Ŝi naskiĝis en 1923 kiel filino de verkistoj Otomar kaj Marie Schäfer. La patro verkis scenarojn por tri filmoj, la patrino kunfondis sanatorion por pulmomalsanaj infanoj. Jana ellernis kvin lingvojn kaj fariĝis ĉiĉeronino. En 1947 ŝi fariĝis esperantistino, kontribuis al movada gazetaro per siaj poemoj kaj

tradukoj, inter 1962-1967 ŝi estis parolistino de esperantlingva elsendo por Aŭstrio de Radio Praha. Ŝiaj poemoj havas titolojn *Liriko intima*, *Kvar sezonoj*, *Pragaj preĝoj*, *Signo de ekkrio*. Eble ŝia lasta laboro estis kontrolo de traduko de *La Grafo de Monte-Kristo* de Daniel Moirand, kiu al ŝi dankas en la antaŭparolo.

Esperantaj elsendoj de Radio-Praha

Radio Praha en la Esperanto-elsendo de la 28-a de februaro envicigis parolon de D-ro J. Jermář, prezidanto de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, dediĉitan al la 85-a naskiĝdatreveno de la kortega konsilisto Hugo Steiner, honorofica direktoro de la Internacia Esperanto-muzeo en Vieno. Sur la foto de maldekstre: redaktoro F. Zajiček, D-ro Jermář kaj s-amino Jana Cichova, prezidantino de la Radio-Komisiono de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato.



Radio Praha elsendas ĉiun lastan jaŭdon de monato, sur 233,3 m (1286 kHz) je la 18.45 horo kvaronhoran programon en Esperanto. En la programo de 30.5 „Muzikfestivalo de Praha“.

Verda duopo – 110 jaroj



Josef Vondroušek (1904-1995) kaj Vilibald Scheiber (1904-1974), honoraj membroj de ĈEA, estis gravuloj de nia movado.

J. Vondroušek tradukis el la verkaro de Karel Čapek, Miloslav Švandrlík, Jan Šmíd, Karel Schulz, Viktor Dyk, Alois Jirásek k.a.

V. Scheiber koncertis kaj muzike adaptis famajn ariojn por tradukisto Jiří Kořínek.

Jubileoj


Jarmila Rýznarová

La 13-an de decembro festas sian gravan jubileon honora membrino de ĈEA, kiun ni jam plurfoje prezentis. Ŝi estras la klubon en Pardubice kaj AEH, helpas ŝin ŝiaj filinoj Lenka kaj Mirka, ankaŭ du nepoj estas esperantistoj. Ŝi zorgas pri la verkaro de d-ro Stanislav Schulhof, prilaboris dokumenton pri la movado en Pardubice, kie ŝi organizis dum socialismo packonferencojn. Ŝi kontribuas ankaŭ al la brazila Almanako Lorenz kaj ŝia lasta verko estas ĉeĥlingva broŝuro pri la vivo de F.V. Lorenc por prezenti lin al la ĉeĥa publiko.




Jindřich Tomíšek

honora membro de ĈEA naskiĝis la 13-an de novembro 1939 kaj en nia movado li estas konata kiel fervora fervojisto, fervojista komitatano kaj organizanto de fervojistaj aranĝoj. Ĝis nun li eldonas regule retan gazeton *el fervoja mondo*, kiu ĉiumonate informas ne nur pri esperantista movado inter fervojistoj, sed pri trajna trafikado ĝenerale, ne nur en Ĉeĥio, sed en la tuta mondo (ekz. *Urboj en Britio planas Nordan projekton, Ŝaka trajno denove trafikis, Forgesi pri nigrablanka, Iomete alia libertempo* k.s.)



František Frýbert

estas reprezentanto de ĉeĥaj esperantistaj radio-amatoroj. Li rememoras, ke en 1969 li magnetofone registris la konstituan kongreson en Brno, sed bedaŭrinde ne scias, kie troviĝas la magnetofona bendo. Espereble ĝi foje aperos. Li naskiĝis la 17-an de septembro 1929. En junaĝo li estis esperantista skolto kaj helpis organizi tutŝtatan kongreson 1950 en Brno, kiel dokumentas konservita filmo.



Zdeněk Závodný

kluba kasisto en Brno naskiĝis la 7-an de novembro 1929. Lia frato Ĉeněk Závodný en 1950 konatiĝis kun M. Bartovská kaj alportis hejmen al vilaĝo Lhotka lernolibron de Th. Čejka, kiu esperantistigis ambaŭ knabojn. Li daŭrigis studadon en komerca lernejo en Frýdek-Místek kaj somera tendaro en Rožnov. Poste li fariĝis kadeto en la slovaka Žilina. Kiel oficiro li ne povis dediĉi sin al Esperanto, sed post emeritiĝo li tuj revenis. Liajn klubajn prelegojn pri diversaj temoj oni povas legi en la kluba retejo de KE Brno.



Jak platit svazu

Pozor, změna účtu!

Nyní Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

Pozor!

Změna předplatného časopisů!

Vzhledem k navýšení cen vydavateli a změně kursu koruny došlo k úpravě předplatného.

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. **311 241 406**, e-mail: polnickypavel@seznam.cz. Předplatné uhradíte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1280,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 720,-Kč

La Gazeto: 640,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: 700,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 440,- Kč.

Juna Amiko: 370,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5

Literatura Foiro: 1280,- Kč (*840,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

Femina: 870,- Kč (*580,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

Heroldo de Esperanto: 1330,- Kč (*870,- Kč), v.s.07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A3

(vydávání HdE není zcela pravidelné!!!)

*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

**Periodikum Ĉeského
esperantského svazu - 45. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

**Předplatné v Česku (bez členství ve
svazu): 200 Kč**

Členská evidence a změny adres:

**p/a Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117**

Uzávěrka příštího čísla: 1.2.2015

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -
- 45-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster Eŭropo
13 eŭroj**

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva numero:
1.2.2015**

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

Kristnaska humuro

"Sinjoro ĉefo, ĉu vi povos liberigi min morgaŭ el la laborejo? Mia edzino volas, ke mi helpu ŝin dum la kristnaska ordigado." - "Morgaŭ absolute ne eblas!" - "Dankon, mi sciis, ke mi povos fidi vin."

"Neniujn kristnaskajn donacojn aĉetu al mi. Sufiĉas, se vi amos min kaj fidelos!" - "Malfruas," vespiras la edzino, "mi jam aĉetis por vi kravaton."

Juĝisto demandas alkondukitan viron: "Pro kio vi estas ĉi tie?" - "Pro tro fruaj kristnaskaj aĉetoj." - "Tio ja ne estas kontraŭleĝa faro. Kiom frue vi aĉetadis?" - "Du horojn antaŭ la malfermohoro."

"Okaze de Kristnasko mi donacis al mia edzino hundon." - "Kial hundon?" - "Mi jam antaŭgojas, ke ŝi sendos min ĉiuvespere kun ĝi eksterhejmen!"

"Panjo, ĉu mi povos havi je Kristnasko hundon?" - "Pri tio forgesu! Vi havos karpon, kiel ĉiuj ceteraj."

Juna knabino ricevis kiel kristnaskan donacon vesperan robon. - "Panjo, el kiu ŝtofo ĝi estas?" - "Ĝi estas el natura silko." - "De tiu eta, malbela vermo?" - "Ĉu vi ne hontas tiel paroli pri via propra patro?!"

Juĝisto: "Ĉu vi povas klarigi, kial vi dum la nokto kvinfoje enŝteliĝis en la saman vardomon?" - "Tio simplas - mi volis doni al mia edzino robon kiel kristnaskan donacon." - "Tion mi komprenus, sed pro kio okazis tiuj pluaj enŝteliĝoj?" - "Poste ŝi sendis min kvarfoje ŝanĝi ĝin, ĉar neniam plaĉis al ŝi la ŝtofo!"

tradukis -padv-



Promensalono en la teatro de Prostějov



*Transdonado de Honoraj Aprezoj
Jarka Malá pro ciferecigado de libroj*



Ekspozicio en la vestiblo de la kinejo Metro



*Anna Vyšínková ricevis honoran aprezon pro
multjara zorgado pri la asocia biblioteko*



KAEST en Slovakio, Modra-Harmonia



*Ing. Libuše Dvořáková prezentas Esperanto-
muzeon en Svitavy*